REFERENCOJ

[1] "Ovidlibro por supere ekzameno", vol. 2, "Skizo de Esperanta Literaturo, pp. 87-88.

[2] W.Auld: "Enkonduko" al Esperanta Antologio, La Laguna, 1958, p. 11.

[3] Dr. Szerdahelyi I.,: "Nemzetközi nyelv - nemzetközi irodalom" /'Internacia lingvo - internacia literaturo'/ "Nagyvilág", mondliteratura revuo, aŭgusto, 1966.,pp. 1220-1224.

[4] Antal L., Tartalom, jelentés, megértés. /Enhavo, signifo, kompreno/, Nyelvtudományi Közlemények, vol. 65., 1963; 439. p.

[5] Общее языкознание, отв. ред. Б. А. Серебренников, Изд. "Наука", М.1970.

[6] А. Г. Волков, Язык как система знаков, Изд. Московского Университета, Москва, 1966, p. 23.

[7] П. Н. Денисов, Принципы моделирования языка, Изд. Московского Университета, 1965.

[8] А. А. Реформатский, Введение в языковедение, Изд."Просвещение", Москва, 1967.

[9] А. Кондратов, Звуки и знаки, Изд. "Знание", Москва, 1966.

[10] D-ro István Szerdahelyi: Esperanto kaj la moderna lingvoscienco,"Hungara Vivo", 1970/2 kaj 1970/3;

[11] The structure of language, Edited by Jerry A. Fodor and Jerrold J. Katz, Recenzo: Yehoshua Bar-Hillel, University of California, "Language", Journal of the Linguistic Society of America, Vol. 43, N-ro 2/1967/ pp.530-531.

[12] V. Vildomec, Multilingualism, Leyden, 1963; Recenzo: W. F. Leopold, "Languag Journal of the Linguistic Society of America, Vol 41, N-ro 1 /1965/ pp.100-105.

SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio

El Vol. 24 n-ro 2/3(100/101) 20.5.1973.

DU LITEROJ - MULTAJ PROBLEMOJ

-pri la esperantaj j kaj ŭ -

/A.Albault, TOULOUSE, Francio/

La naturo de la Esperantaj sonoj prezentataj per la literoj *j* kaj ŭ estas unu el la plej tiklaj punktoj en la Esperanta fonetiko. Ne estas konata verko, kiu funde traktus ilin. Ĉi-sekve mi nur levos kelkajn demandojn, sed neniel pretendas prezenti definitivan tezon pri ili.

Foririnte de la efektivaj literkombinoj - kaj mi limigos min al tiuj troveblaj en la Fundamento por doni samtempe bildon finitan kaj plenan -, mi raportos la opiniojn de la diversaj aŭtoroj. Poste, por iom ordigi la nociojn, mi proponos kelkajn difinojn; fine, mi diskutos kelkajn problemojn de fonetismo kaj de grafismo. La konkludon mi lasos al la publika opinio kaj al la bona uzo.

* * *

Kiel sciate, la du literoj *j* kaj ŭ formas ne nur la grupojn *aj, ej, oj, uj, aŭ, eŭ,* kiuj en sia tuto estas tiom karakterizaj de la Esperanta elparolo kaj skribo, sed ankaŭ la grupojn *ja, je, jo, ju* troveblajn en multe pli da lingvoj. Plie ili formaş aliajn grupojn, kiel *oŭ, ŭa, ŭe, ŭo* ... kiuj penas penetri en la lingvon. Ni ankaŭ citu *ij* kaj *ji,* kiuj almenaŭ teorie estas eblaj. Fine ni ne forgesu la kombinojn, kiujn *j* formas kun diversaj konsonantoj: *nj, lj,..*

Se nin limigi al la sola Fundamento, ni nombras 83 radikojn (kaj aliajn elementojn), kiuj entenas po unu j. Ni povas klasi ilin jene:

A. *36 radikoj kun j silabokomence:*
1. *iniciale (18):* ja, jam, Januaro, jaro, jes, jugo, juglando, juĝi, juki, Julio, juna, jungi, Junio, junipero, jupo, juro, justa, juvelo.
2. *inter du radikaj vokaloj (9):* bajoneto, cejano, fajenco, kajero, kajuto, krajono, majesta, projekto, vojaĝi.
3. *antaŭ finaĵo (9):* boji, ejo, fojo, frajo, gaja, ĝoji, levkojo, Majo, vojo (silabi: boj-i,... ŝajnas al mi nerealece)

B. *35 radikoj kun j silabofine aŭ antaŭ konsonanto:*
1. *antaŭ l (10):* ajlo, emajlo, fajli, gajlo, hajlo, kanajlo, najlo, pajlo, tajloro; mejlo.
2. *antaŭ n (9):* ajn, gajni, grajno, ŝajni, semajno; vejno;

fojno, kojno; prujno. (Tie aldonendas ĉiuj pluralaj akuzativoj simboleblaj per: R-ajn, R-ojn, I-ujn).
3. *antaŭ t kaj d (6):* najtingalo, rajto, rajdi, trajto; hejti; lojto.
4. *antaŭ diversaj konsonantoj (7):* fajro, salajro; najbaro, fajfi; hejmo, pejzaĝo; majstro.
5. *vortfine (3):* kaj, plej, tuj (komparu: kajo, tujo).(Tie ĉi aldonendas ĉiuj neakuzativaj pluraloj R-aj, R-oj, I-uj).

C. *12 radikoj kun j post konsonanto:*
1. *en la grupoj nj aŭ lj (7):* Bulonjo, -nj-, sinjoro; konjekti, konjugacio, konjunkcio; buljono.
2. *post aliaj konsonantoj (5):* adjektivo,-ĉj-, interjekcio, objekto, subjekto.

La Fundamentaj vortoj entenantaj la literon *ŭ* estas kompare malpli multaj: nur 52. Plie nur du el ili entenas la grupon *eŭ*, nome: *Eŭropo, leŭtenanto*. La 50 aliaj entenas la grupon *aŭ*; ili estas jene klaseblaj:

A. *24 radikoj entenas aŭ en la akcenta silabo:*
1. *unusilabaj radikoj:* aŭdi, daŭri, faŭko, fraŭlo, haŭto, ĵaŭdo, kaŭzi, laŭbo, laŭdi, laŭro, laŭta, naŭzi, paŭzo, Paŭlo, plaŭdi, raŭka, raŭpo, saŭco, ŝaŭmo, ŝraŭbo, taŭgi.
2. *dusilabaj radikoj:* alaŭdo, aplaŭdi, bedaŭri.

B. *17 vortoj kun la "neŭtrala" finaĵo -aŭ:*
adi-, almen-, amb-, ank-, ankor-, anstat-, ant-, apen-, bald-, ĉirk-, hier-, hodi-, kontr-, kvaz-, malgr-, morg-, presk-.

C. *9 aliaj vortoj:*
1. Aŭgusto, aŭskulti, aŭtoro, aŭtoritato, aŭtuno; kaŭterizi.
2. aŭ, laŭ, naŭ.

Estas ne malpli interese, pro kontrasto, konstati, kiuj estas en la Fundamento la aliaj vokalkombinoj entenantaj *i* aŭ *u*. 117 Fundamentaj radikoj finiĝas per i, 68 entenas i sekvatan de alia vokalo, nur 31 radikoj finiĝas per u, aŭ per alia vokalo.

*
* *

Jam la Fundamento (en la du unuaj "Ekzercoj de legado") zorge diferencigas la du specojn de kombinoj; ekz-e: Ru-i-no, Pruj-no; Tra-u-lo, Fraŭ-lo; Ba-la-i, Pa-laj, ... La unuaj vortoj de ĉiu paro estas trisilabaj, la duaj - dusilabaj. Alivorte, j kaj ŭ kondutas kiel konsonantoj. Tion ĉiuj aŭtoroj zorge instruas. Tio estas la esenco de la tuta afero; la cetero estas komentoj. Tamen oni riskas unuan eraron, se oni ne bone precizigas sian penson: ili kondutas kiel konsonantoj, *koncerne la silabadon*. Kun tiu precizigo, eblas diri, ke ili ĉiam rolas kiel konsonantoj, ĉu ili estas antaŭ aŭ post vokaloj. Ni pli poste studos la ĝustecon de tiu aserto kaj ĝiajn limojn. Sed *koncerne al iliaj sonoj*, tio estas alia afero kaj ja tion ni intencas pristudi!

La supre diritan Zamenhof konfirmis en la "Lingvaj Respondoj" (Vd. 6-an eld., p.58-59) kaj eĉ aldonis: "en nia lingvo ekzistas la literoj *ŭ* kaj *j*, kies elparolado estas simila al la elparolado de *u* kaj *i*, sed pli mallonga kaj ne prezentanta silabon (kiel konsonanto). ... ... La literoj *ŭ* kaj *j* ĉiam ankaŭ estas elparolataj aparte, sed ili ĉiam estas konsonantoj, tute egale, ĉu ili staras antaŭ vokalo aŭ post vokalo." Do, literoj, kiuj en la silabado rolas kiel konsonantoj sed sone similas al vokaloj: mallongaj *u* kaj *i*.

Pro tio la E-aj aŭtoroj hezitas en ilia nomado: duonvokaloj, duonkonsonantoj, konsonantoj-vokaloj, ktp. Fakte en fonetiko oni ofte nomas ilin semi-vokaloj. Kompreneble la komentoj de l' diversaj aŭtoroj ne estas plej klaraj. Pro pluraj motivoj. Unue necesas klarigi per la sonoj de l' propra nacia lingvo. Due la terminologio, se ni konsideras la periodon de la 1900. ĝis hodiaŭ, ne estis internacie fiksita. Trie la fonetismo de nia lingvo, se ĝi iom post iom praktike pli malpli fiksiĝis, tamen bezonas esti teorie difinita.

De Beaufront (1900.) komparas la silabojn *aj,ej,uj* al la francaj *aille, eille, ouille* (molaj l); sed tiuj francaj silaboj ne estas ĉie same prononcataj; plie en la sudo ili estas du silaboj, ĉar la "muta" *e* tie fakte aŭdiĝas, kio tamen influas la prononcon de l' sono sekvanta la vokalon. Kiel bedaŭrinde, ke por *j* li ne uzis similan esprimon, kiel por *ŭ*, nome: "ŭ, tre mallonga vokalo kies sono egalas u".

Cart kaj Pagnier (1902.) korektas: "oni komprenu per mola l la parizan, en kiu la sono l ne plu aŭdiĝas". Jam pli bona proksimigo. Sed kial konfuzigi la lernanton per jena nenion-klariga "klarigo": "Fakte j estas duonvokalo nur en la silaboj *aj, ej, oj, uj* (= *aĭ*, ktp...), aliloke ĝi estas konsonanto". Apud la silabiga rolo, ne eniru en tian subtilaĵon, aŭ iru ĝis la fino!

Nenio notinda en "Premières leçons d' E-o" de Cart (1903.), sed en la portugala traduko de Caetano Coutinho (1906.) ni legas:

j	i	breve	(máio, rúivo)
ŭ	u	breve	(Páulo)

La portugala ebligis klaran indikon, notindan.

M.Verema (Fonetiko Litera, 1906.) identigas j al germana joto kaj notas, ke ĝi "sin ligas tre facile kun b, v, d, z, ĵ, g". Sed "kun p, f, t, s, ŝ, k" ĝi alprenas najbaran sonon: tiun de l' dolĉa germana ch. Aliparte, laŭ li Francoj "pro timo elparoli" *sinjoro* kun mola n (franca gn) "kiel en sia lingvo, diras zorge: *sin-joro*, kio estas tre peniga, aŭ diras: *sinioro*."

Ĉefeĉ (1907.) aldiras nenion instruan, sed Gaston Moch (1907.) nomas j kaj ŭ duonvokaloj aŭ vokaloj-konsonantoj. Analizante la francajn duonvokalojn, sonoj kiuj antaŭiras vokalojn, li nombras tri:
- "tre mallonga i aŭ y, identa al la Esperanta j: *piano, pied, Dieu, yeux, hargneux, ignorer, piou-piou, bien, nation, bataillon, travail, fille, règne*";
- "tre mallonga u, identa al la Esperanta ŭ: *oui, loi, loin*";
- "kaj tre mallonga ü: *nuit, suint*".

Fakte ni rimarku, ke en *bataillon, travail, fille* la duonkonsonanto estas post la vokalo (batajon, travaj, fij) kaj plie eblas dubi, ĉu tie temas pri "mallonga i" aŭ pri io alia. Fine en hargneux kaj ignorer Moch similigas gn kaj nj...

W.E. Collinson en artikolo datanta de ĉirkau la 1910. kaj respondanta al idistaj kritikoj donas el trans la Manika Kanalo jenajn bonegajn komentojn: "Esperanto, same kiel la alfabeto de l' Internacia Fonetika Asocio kaj ĉiuj lingvoj de centra kaj orienta Eŭropo, donas al *j* la valoron de konsonanta aŭ duon-konsonanta *i*." Kaj pli poste:" De Beaufront diras, ke *ojn, ajn* ne povas prononciĝi sen elartikigo de l' makzelo. La vero, en tiu okazo, estas ke la 'digrafoj' *oj, aj* kaj *uj* prononciĝas kiel diftongoj, t.e. kiel kombinaĵoj de du vokaloj aŭ de unu vokalo kaj unu duon-vokalo, dum la franca *-aille*, kiun li citas, estas kombinaĵo de vokalo kun aperta konsonanto. *Aj* prononciĝas kiel en la angla *die*, kaj *oj* kiel en *boy*. Komence de silabo, *j* povas prononciĝi aŭ kiel duonvokalo (angla *y* en *yes*),aŭ en maniero pli forta kiel en la germana *ja*."

En sia "Dr.Zamenhofs sprachliche Gutachten" (1921.) Walter Lippmann komentas la principon "Por unu sono unu litero" jene: "Fakte estas en E-o por unu sono ne pli ol unu litero, kvankam por tri duoblaj sonoj estas nur po unu litero (t-s = c, t-ŝ = ĉ, d-ĵ = ĝ) kaj por du malsamaj sonoj, esceptokaze, nur unu litero: j = 1. konsonanto *j* en *jako, juna, ejo, kajo;* 2. mallonga *i* en *kaj, plej, fojno, prujno."*

La opinioj de Moch kaj Lippmann tre malsimilas: ni ĵus vidis, kiel Collinson respondas al ambaŭ.

Edmond Privat (Kursa Lernolibro) parolas pri duonvokaloj, "kiujn oni ne kalkulas kiel vokalojn, sed kiel konsonantojn en la silabnombro". Plie li tabele komparas ilin al la literoj de l' Internacia Fonetika Alfabeto, de l' franca, de l' angla kaj de l' germana jene:

ŭ	w	ou (ouate, oui)	w	u (au)
j	j	y	y (boy, yes)	j

Ni tamen alnotu, ke multaj vortaroj, kiuj uzas la Int.Fon. Alfabeton montras anglajn vortojn jene: now (nau), boy (boi), nes (ies), kaj ankaŭ: my (mai), play (plei)...

Nylen ("Sonoj kaj vortoj de E-o", 1930.) unue kritikas la terminojn "duonvokaloj" kaj "diftongoj". "Car ni, li diras, en la sveda lingvo ne parolas pri "diftongoj", sed nur pri vokaloj kaj konsonantoj, tiu parolo pri diftongoj ne interesas nin praktike; por nia rigardmaniero *ŭ* kaj *j* estas klaraj konsonantoj, samrangaj kiel *l, r, m, n,* ktp." Sed post tiu teoriumado venas io eminente praktika, nome: "tamen svedoj devas zorgi pri bona elparolo de *j = i*, t. e. pli simila al mallonga i."

Grenkamp-Kornfeld ("Kompleta Gramatiko kaj Vortfarado de E-o", 1930.) male agnoskas la diftongojn: "diftongo nomiĝas kuniĝo de unu vokalo kun duonkonsonanto *ŭ* aŭ *j* kaj prononcataj per unu elspiro: *aŭ, eŭ, aj, ej, oj,* ktp..." Laŭ li, " litero j estas duonkonsonanto nur ĉe l' finaj silaboj de vorto (kaj kompreneble kiam ĝin antaŭas vokalo): *kaj,plej,ĉarmoj, maj',ĝoj'* kajantaŭ konsonanto: *ajlo, sojlo, prujno.*

Laŭ la "Plena Gramatiko" (K.Kalocsay kaj G.Waringhien, 2-a kaj 3-a eldonoj) ekzistus en Esperanto kvar duonvokaloj: du postmetitaj al vokaloj kaj du antaŭmetitaj; kaj plie du konsonantoj. Jen la koncerna noto en sia pleneco (p.39 de la 3-a eld.):

"Teorie oni povas distingi kvar duonvokalojn:

1. i-sonon kaj u-sonon troviĝantajn post alia vokalo kaj formantajn kun tiu unu silabon. En tiu okazo, la buŝo vaste malfermiĝas por prononci la unuan vokalon *(a, e, o, u,)* kaj dum ties fermiĝo aŭdiĝas la "duonvokalo" mallongigita. La diferenco inter tiu i-sono kaj la j-konsonanto estas tre subtila, tial ankaŭ ne estas necese havi por ĝi apartan literon; en E-o oni signas ĝin per simpla *j*. Fonetike eble oni povus distingi ĝin per *y: homoj / homoy /, plej /pley/*. La u-sonon oni signas per *ŭ: baldaŭ, aŭdi.*

2. i- kaj u-sonon troviĝantajn antaŭ vokalo kaj post konsonanto kaj aŭdiĝantaj dum la malfermiĝo de la buŝo. En Esp-o ili ekzistas nur, kiam en la poezio la ritmo mallongigas ordinaran *i* kaj *u :kormilionoj /kormilyonoy/, buduaro /budŭaro/.*

Krome ekzistas la konsonanta j (vortkomence, aŭ inter du vokaloj: *jen, foje*). Al ĝi respondus la vortkomenca ŭ (fonetike: *w*).estigata preskaŭ ne per la voĉkordoj, sed per la lipoj. Sed ĝin oni trovas nur en kelkaj proponitaj vortoj *(vaĉi, vato)*".

Verŝajne ĝi estas unu el la plej bonaj eksponoj de l' temo. Tamen ŝajne ĝin devus korekti la opinio de Collinson. Ni nur aldonu, ke ordinare la aluditajn "proponitajn vortojn" oni skribas per ŭ *(ŭato, ŭesto)*, se oni ne preferis uzi la literon v *(vaĉi, varfo..)*.

Esence saman starpunkton havas Leopold Kitzler en sia "Internacia Gramatiko de E-o" (1934.), kiu konklude aldonas: "Ĉe la litero j temas eĉ pri nur unu skriba signo por 2 (kvankam parencaj) sonoj". Ni hodiaŭ povus diri tion saman pri ŭ.

Camille Aymonier ("Grammaire complète", 1935.) diras franclingve: "j (konsonanta i) nomiĝas *yod* en fonetiko. Ĝi prononciĝas same kiel y, komence de l' vortoj: *yole, yeux*. Post la vokaloj *a, e, o, u,* ĝi aŭdigas la sonon aŭdatan en la franca vorto *bataillon* prononcata *bata-yon; payer* prononcata *pè-yè*". Kaj pli poste: "ŭ prononciĝas kiel kurta *u*. Envere ĝi estas konsonanta *u*, same kiel *j* estas konsonanta *i*".

Waringhien (ABC d' Espéranto ..., 1945.) klarigas jene: "Kunigitaj al la semi-vokaloj *j* (= *y* en *yeux*) kaj *ŭ* (= *ou* en *oui*) la vokaloj formas jenajn diftongojn: *aj* (kiel en *ail*), *ej* (kiel en *treille*), *oj* (kiel en *boy*), *uj* (kiel en *rouille*), *aŭ* (kiel en: *boîte à outils*), *eŭ* (kiel en: *est-ce vrai ou non*).

Fernando Soler y Valls ("E-o al alcance de todos", 8-a eld., 1960.) en sia hispana gramatiko diras: "la semi-vokalo *ŭ* havas la saman sonon kiel la *u;* ĝi uziĝas nur post la literoj *a, e ... aŭ,eŭ* prononciĝas kiel en la kastiliaj (= hispanaj) vortoj *cau-ce, Bautista, Ceu-ta, deu-dor*. Pro tio la litero *ŭ* ne devas esti konsiderata kiel vokalo, sed kiel konsonanto. - *J* sonas kiel *y* uzata en la kastilia; ekz-e: jes (yes), juna (yuna)".

Butler en nedatita eldonaĵo pri la alfabeto diras pri niaj du literoj: "ili reale rolas kiel konsonantoj, kiam ili antaŭiras vokalon, kaj formas kun ĝi silabon, sed kiel vokaloj, kiam ili formas diftongon kun antaŭiranta vokalo.

* * *

Por provi iom ordigi la diversajn faktojn kaj nociojn, ni iom studos unue la silabadon kaj due la sonojn "ŝuŝajn" kaj diftongajn.

I. S I L A B A D O

Jen punkto pri kiu ŝajne ĉiuj konsentas: ŭ kaj j rolas kiel konsonantoj en la silabado, ne kiel vokaloj; ili ne povas krei silabon, ili kondutas kiel konsonantoj.

Sed ne ĉiuj konsonantoj kondutas same, nek same en ĉiuj okazoj. Ni konsideros la du okazojn kiam unu, respektive du konsonantoj staras inter vokaloj. La okazoj kun pli da konsonantoj aŭ ne interesas nin, aŭ facile rekondukiĝas al la samaj rimarkigoj. Ni plie limigas nin al nekunmetitaj vortoj. Simplige kaj skeme ni nur diru ke preskaŭ ĉiam eblas konsideri, ke ekzistas dividstreketo inter du radikoj de sama vorto, aŭ, se oni preferas, ke silab-limo koincidas kun radikolimo; se okazas, ke tio ne evidentas per si mem, estas preferinde efektive skribi la streketon aŭ aldoni ligan vokalon: ekz-e, skribu aŭ radik-limo aŭ radikolimo, sed evitu radiklimo, mislegebla kiel ra-di-kli-mo.

1. Kiam estas nur unu konsonanto inter du vokaloj, la konsonanto apartenas al la dua silabo. (Ĉi-sekve, ni signos per asterisko la ekzemplojn prenitajn el unu el la du Fundamentaj "Ekzercoj de legado", en kiuj la silaboj estas indikitaj). Ekz-e:

si-ge-lo le-vi-lo* pa-ro-li**

Se temas pri *j*, estas tiel same:

*Ma-jo** *ka-je-ro** *lo-ja-la* *bo-ja-do*

Sed - krom en kelkaj propraj nomoj, kiujn ni preterlasu - *ŭ* aperas intervokale nur en derivitaj aŭ-vortoj. La demando estas, ĉu silabi ilin laŭ la ĝenerala regulo, nome:

a-pe-na-ŭa *la-ŭa* *na-ŭa*

en kiu okazo ni devas konfesi, ke Esperanto ekde sia orgino posedas la kombinojn *ŭa, ŭe, ŭi, ŭo, ŭu*, aŭ ĉu male konservi netuŝita la diftongon, t.e.:

a-pe-naŭ-a *laŭ-a* *naŭ-a*

Ambaŭ manieroj estas defendeblaj. La du Fundementaj ekzercoj ne donas ekzemplon; laŭ mia scio neniu rekomendis unu manieron aŭ la alian. Mi nur rimarkigu parenteze, ke, se oni atentus la dirojn de Zamenhof, laŭ kiu *-aŭ* estas finaĵo "neŭtrala sed difinita", kiu "ne apartenas al la radiko", kaj se oni aplikus la misformulitan koncernan toleron de la Akademio, oni senbalastigus tiujn vortojn en derivado per forigo de senutila finaĵo (leĝo de sufiĉo): de *apen-aŭ, ĉirk-aŭ, hier-aŭ* oni facile derivus: *apen-a, ĉirk-e, hier-o.* Tio per si mem reduktus la dubon en la silabado al nur du okazoj: la derivaĵoj de la du vortoj: *laŭ* kaj *naŭ*. Tiam estus pli simple obei la ĝeneralan regulon *(la-ŭe,na-ŭo-no)* kaj ne fari escepton por du radikoj. Sed tian konsilon mi ne volus doni, se ĝi devas inkludi la tutan serion de aŭ-vortoj...

2. *Kiam estas du konsonantoj inter vokaloj*, oni devas distingi du okazojn:

a) *ĝenerale*, la unua konsonanto apartenas al la unua silabo, kaj la dua - al la dua:

*cen-to** *.gip-so** *gus-to** *ĝar-de-no**

*reg-no** *ver-so** *tu-mul-to**

b) se la dua konsonanto estas *l* aŭ *r* post iuj konsonantoj (nome: *p,t,k; b,d,g; f,v)* aŭ se ĝi estas *v* post *k* aŭ *g*, ambaŭ apartenas al la dua silabo:

*ci-pre-so** *ci-tro-no** *a-kri-do*

He-bre-o *a-dre-so* *a-gra-bla*

re-pli-ki *A-tlan-ti-ko* *pro-kla-mi*

res-pu-bli-ko *a-glo-me-ri*

A-fri-ko *ko-vri*

in-fla-mo

*li-kvo-ro** *i-gva-no*

(la Fundamenta ekzemplo pat-ro* oponiĝas al la cititaj kaj devas esti konsiderata kiel erara; tamen la ekz-o *ak-vo**, kiu oponiĝas al *li-kvo-ro** kaj al *lin-gvo** ŝajne estas pli kompleksa)

Nu, kio okazas kun *j* kaj *ŭ*, se unu el ili troviĝas kune kun konsonanto inter du vokaloj?

Unue, se ili venas tuj post vokalo, ili nepre apartenas al la unua silabo, dum la konsonanto apartenas al la dua:

*pruj-no** *vej-no** *foj-no**

gaj-ni *fraŭ-lo** *Eŭ-ro-po**

En tiu okazo j kaj ŭ sekvas do la ĝeneralan regulon, kaj sekve estas konsidereblaj kiel konsonantoj koncerne la silabadon.

Due, ni konsideru la okazon, kiam *j* aperas post la konsonanto. Ĉu ni do silabu:

Bu-lo-njo *si-njo-ro* *bu-ljo-no*

Ili efektive aspektas pli normalaj ol:

Bu-lon-jo *sin-jo-ro* *bul-jo-no*

Sed male jen aliaj Fundamentaj vortoj, pli normalaj jene:

kon-jek-ti *kon-ju-ga-ci-o* *kon-junk-ci-o*

ad-jek-ti-vo *in-ter-jek-ci-o* *ob-jek-to* *sub-jek-to*

Ni do alvenas al la ideo, ke *j* povas formi la grupojn *nj* kaj *lj* kaj tiam ĝi sekvas la esceptan regulon, t.e. ke la nomitaj grupoj apartenas al la sekva silabo. Aliparte tiuj grupoj verŝajne ĉiam ekzistas kiel tiaj, krom en la okazoj kiam *n* (kaj eble foje *l* ?) apartenas al pseŭdoprefikso: ĉi tie ni vidis tri ekzemplojn kun la pseŭdoprefikso *kon-*. Tio estus ankaŭ la okazo kun la pseŭdoprefikso *in-* en ekz-e: *in-jek-ti*.

Tute speciale *-nj-* eĉ estas sufikso:

pa-njo *E-mi-njo*

Eble, pro vortfaraj konsideroj, necesas alkalkuli al ĝi la sufikson *-ĉj-:*

pa-ĉjo *Jo-ĉjo*

Fine, ni ne konas ekzemplon, en kiu *ŭ* aperas post konsonanto Ni do povas resumi jene:

Kiam *j* aŭ *ŭ* aperas kun konsonanto inter du vokaloj, ili ĉiam sekvas la ĝeneralan regulon de silabado kaj estas do konsidereblaj ĉi-rilate kiel konsonantoj: la unua apartenas al la unua silabo kaj la dua - al la dua. Tamen - krom post la pseŭdosufiksoj *kon-* kaj *in-* - *j* formas la kombinojn *nj* kaj *lj*, kiuj sekvas la esceptan regulon de la likvidoj kaj de v: t.e. la kombinoj *nj* kaj *lj*, same cetere kiel la sufikso *-ĉj-*, apartenas al la sekva silabo.

* * *

II. L A S O N O J.

A.-Ŝ U Ŝ A J S O N O J. Ekzistas tuta vico da sonoj, la frikativoj aŭ frotaj sonoj, por kiuj la aerkolono ne estas plene interrompita, sed nur iom stringita en diversaj punktoj. Ekz-e, se la stringo okazas ĉe l' palato oni povas aŭdi la konsonanton j pli precize la germanan *joton*, ekzemple; se la stringo okazas inter la lipoj, eblas aŭdi ekzemple la anglan konsonanton *w* (en *winter...*). Kun stringoj en aliaj lokoj, aŭdataj estas *ŝ, ĵ* aŭ *s, z*, aŭ ankoraŭ *f, v*, ktp...

Ĉiuj ĉi sonoj estas karakterizitaj per tio, ke ili aŭdiĝas ian pli malpli fortan siblon, ian susuron, ian apartan frotbruon, ja diversan kaj apartan por ĉiu: tiujn diversajn frotbruojn ni nomos *ŝuoj*, kaj ni parolos pri *ŝuŝaj sonoj*. La Esperantaj ŝo, ĵo, so, zo, fo, vo estas ŝuŝaj sonoj: ili ŝuŝas, aŭdiĝas ŝuŝon.

Ni malfermu etan parentezon por pravigi la formon de tiu termino, kiu verŝajne ne enkondukiĝis en la lingvon ĉefe pro tio, ke tute mankas por ĝi internacia formo. En la 1905. la "Int. Scienca Rev."(p.268) uzis la formon *ŝuinto* prenita el la franca verbo *chuinter*, sed angloj diras *(to utter) hushing (sounds)*, germanoj *zischen*

schen kaj rusoj *prišepětyvati*. Nura komuna punkto inter tiuj vortoj: šušanta ŝo-sonoj. Paralele rimarkindas, ke en pluraj lingvoj la vorto por la signifo *fluetri* iel similas, se ne parencas, al tiu por *šuši*; plie ili iom pli intersimilas: F. *chuchoter*, G.*zischeln*; *tuscheln*, H. *cuchichear*, R. *šušukatĭsâ*, Bl. *šušna*; *šušukam**), Sb-Kr. *šuškati*, Hg. *súg* , ... Resume, *šuši* aperas, kiel onomatopea vorto inspirita de franca-slava simileco por parencaj vortoj. Ni fermu la parentezon kaj nun revenu al niaj bredataj ŝafoj!

Ni ĉi tie volas paroli nur pri du ŝuŝaj konsonantoj: la *j* kaj la *w*, kiujn posedas la Internacia Fonetika Alfabeto kaj kiuj plimalpli respondas al *jo* kaj *ŭo* de nia lingvo.

1. La konsonanta *j* estas speco de i-sono akompanato de malforta ŝuŝo. Cetere laŭ la lingvoj kaj la individuoj tiu ŝuŝo estas plimalpli forta: oni povas sekve imagi seninterrompan vicon da sonoj, kiuj foririntaj de l' pura vokalo *i* akirus pli kaj pli fortan ŝuŝon dum ĝi pli kaj pli perdus la i-sonecon: ĝi pasus "tra" *j* kaj alvenus al la pura konsonanto *j*.

Kiam oni elparolas *jaro*, *juna*, oni efektive povas aŭdigi iom pli fortan ŝuŝon, same kiel en la germanaj *Jahr* kaj *jung*. Ĝin produktas la froto de l' aer-kolono kontraŭ la palato.

Konvencie, ni prezentos en tiu artikolo tiun varietaton de *j*, tiun pli forte ŝuŝantan konsonanton per la litero *y* (igrek): ni do figuros la supre aluditan prononcon jene:

[ya-ro, yu-na].

En la diversaj lingvoj tiu ŝuŝa sono povas troviĝi jen antaŭ vokaloj, kiel ni jus vidis en la germana, jen malantaŭe, kiel en la nuna franca; ekz-e, *semaille*, *treille*, *fille*, *houille* elparoliĝas:

[së-may!, trey, fiy, uy]

en kiuj la signo *!* montras, ke la antaŭa silabo estas akcenta kaj la litero *ë* signas la obtuzan sonon de *e* en F.*le*, *je*, *de* aŭ en G. *fahren*, *sagen*, *Maurer*. Ili tiel elparoliĝas almenaŭ norde de Luaro; en la sudo de Francio aldoniĝas postakcenta *ë* kaj sekve plia silabo, do jene: [së-ma-yë, tre-yë, fi-yë, u-yë]

Oni preterpase rimarku la akcenton sur la antaŭlasta silabo! (ni ne indikas la akcentojn, kiam sur la antaŭlasta).

2. Iom paralelajn rimarkojn ni povas starigi pri la konsonanta ŭo, speco de u-sono kun malforta ŝuŝo.

Tre malfortan ŝuŝon oni aŭdas en la angla *watt*: ĝin realigas aerfluo glitanta inter la lipoj sufiĉe interproksimaj. Kompreneble oni povas aŭdigi la saman sonon en la Esperanta /wa-to/, ordinare skribata *ŭato* (kiam alia vort-formo ne estas preferata!).

Sed, diference de *j* al kiu estis dekomence atribuitaj la du funkcioj (ŝuŝa kaj diftonga), *ŭ* origine estis nur duonvokalo post *a* kaj *e*. Tamen iom post iom oni estis kondukata ekuzi ĝin en la konsonanta funkcio por asimili pli-malpli internaciiĝintajn vortojn de anglo-saksona origino: *watt*,*west*...: *ŭato*, *ŭesto* ... aŭ ankaŭ geografiajn nomojn, ĉefe el Ekstrem-Oriento.

*) Ni uzas por la cirila alfabeto la transskribon jam priparolitan en "Monda Kulturo"(Vintro 1965, p.28) rekomenditan de la Terminologia Centro de ISAE. Tiu alfabeto estas jena: a, b, v, g, d, e (ë), j, z, i, ĭ, k, l, m, n, o, p, r, s, t, u, f, x, c, č, š, ŝ, ŭ, y, ĭ, è, û, â. Senutile diri, ke tiuj literoj havas nenion komunan, kun tiuj uzataj por indiki la prononcon. Ni konsideras tiun alfabeton, kiel ekvivalenton de l' aŭtenta kaj ĝin uzas, kiam la aŭtenta ne estas presebla aŭ montriĝus neoportuna, kiel en la nuna artikolo.

Ĉi-sekve - en la prononc-indikoj - ni donos al la literbildo *ŭ* nur la originan funkcion de duonvokalo, dum ni prezentos la konsonanton per *w* (bive).

B.-D I F T O N G A J S O N O J. Laŭdifine, diftongo estas sona kombino de du vokaloj unusilabe prononcatoj, el kiuj unu estas sonanta (la ĉefvokalo) kaj la alia kun-sonanta (la helpvokalo).

Rim.1.: En iuj lingvoj oni emas konfuzi la diftongojn kun la digramoj. Ĉi-lastaj reprezentas unu sonon, jen vokalan, jen konsonantan, per du literoj: F.ai (=e), G. ch (=ñ), æ = ä (=è); ekzistas ankaŭ trigramoj: F.eau (=o), G. sch (=š). Male en iuj lingvoj diftongo povas esti reprezentata per nur unu litero; ekz-e la angla vorto *I* estas la diftongo aĭ. La cirila alfabeto posedas plurajn literojn, kiuj prezentas verajn diftongojn, ktp.

Rim.2.: Kutime la ĉefvokalon oni nomas simple vokalo, kaj la helpvokalon - duonvokalo (aŭ semi-vokalo).

Estas du specoj de diftongoj: la desecendaj kaj la ascendaj,laŭ la pozicio de la ĉefvokalo.

1. - En la descendaj diftongoj, la ĉefvokalo estas unua. Ekz-e: *aŭ*, *eŭ*, *oŭ*...; *aĭ*, *eĭ*, *oĭ*, *uĭ* (ĉi-lastaj respondas al la Esperantaj: aj, ej, oj, uj). La prezento de l' semi-vokalo *i* per *ĭ* - kiun ni vidis uzata de Cart jam en la 1902. - same kiel *ŭ* memorigas ne nur la mallongan latinan *i* (*ĭ*), sed ankaŭ la cirilan *kurtan i* (*й*) . Jen kelkaj ekzemploj:

A. *down* /daŭn/, infren; *fine* /faĭn/, fajna; *boy* /boĭ/, knabo.

G. *Laube* /laŭ-bë/, laŭbo; *fein* /faĭn/, fajna; deutsch / doĭĉ/.

H. *auroro* /aŭ-ro-ro/, aŭroro;*aire*/aĭ-re/,aero;*hoy* /oĭ/,hodiaŭ.

R. *auditoria* /aŭditorija/, aŭditorio; *balalaĭka* /ba-la-laĭ-ka/, balalajko; *moĭ* /moĭ/, mia.

Rim.3.: ordinare, la Internacia Fonetika Alfabeto estas malpli preciza ol la Esperanta alfabeto: plej oftaj verkoj uzantaj la I. F.A., el tiuj, kiujn mi konsultis, simple notas: *daun*, *fain*, *boi*..

Rim.4.: ekzakte /doĭĉ/ ne devus enteni *ĭ*, sed semi-vokalan *ŭ*.

2.-En la ascendaj diftongoj, la ĉefvokalo estas lasta; ekz-e: ĭa, ĭe, ĭe, ĭu; ŭa, ŭe, ui, ŭo, ŭu. Ekzemploj:

F. *radio* /ra-dĭo!/, radio; *poide* /pŭa/, pezo; *oui* /ŭi/, jes.

H. *radĭo* /ra-dĭo/, radio; *igual* /i-gŭal!/, egala; *muela* /mŭela/, muelŝtono.

A. *loyal* /lo-ĭël/, lojala; *equal* /i-kŭël/, egala; *wood* / ŭud/, ligno.

R. *Franciâ* /fran!-ci-ĭa/, Francio; *net* /nĭet/, no (=interjekcia ne)

Rim.5.: La rusa estas aparte riĉa pri tiaj i-diftongoj; ĝi eĉ disponas pri apartaj literoj por ilin prezenti; literoj, kiujn ni transskribas, respekte al la origina skribo, per unuliteraĵoj:*â*,*û*, *ë* ... Jen tipa rusa frazo montranta tiun riĉon:

â ne lûblû eë
proksimume: /ĭa nĭe lĭu-blĭu ĭe-ĭo/
mi ne amas ŝin

Rim.6.: En la franca, ekz-e *oui* /ŭi/, jes, se erare prononcat: kiel descenda diftongo /uĭ/ - kaj tion kulpas ofte nefrancoj - tre similas al la vorto por koaksо: *houille* /uy/, aŭ en la sudo /u-yë/

Aparta principa demando leviĝas: ĉu estas prave uzi la saman signon (respektive ŭ kaj ĭ) en ambaŭ tipoj de diftongoj, la ascendaj kaj la descendaj?

Nu, unue ŝajnas al mi, ke se temus efektive pri po du apartaj sonoj, la nura malsama pozicio antaŭ kaj post la ĉefvokalo, sufiĉus por ilin distingi. Se al iu tio ne sufiĉus, li povus ilin distingi en maniero simila al tiu de M. Verema en sia "Fonetiko litera"; sed tiu aŭtoro distingis ankaŭ du varietatojn por ĉiu el la konsonantoj: ekz-e, estas du k: unu en *ek*, alia en *ke!*

Due, mi dubas, ĉu temas pri po du apartaj sonoj: ni atentu, ke la helpvokaloj esence sonas kiel la respektivaj vokaloj. Ilia helpvokaleco konsistas nur en tio, ke ili kunfandiĝas al alia vokalo por formi ununuran silabon. Ilia aparta skribo en E-o - kio plej ofte ne ekzistas en aliaj lingvoj - nur ebligas drastan simpligon kaj raciigon de l' ortografio.

* * *

Laŭ la Plena Gramatiko kaj kontraŭ la opinio de Collinson la ascendaj diftongoj ne ekzistus en Esperanto: *j* kaj *ŭ* antaŭ vokaloj ne estus helpvokaloj en diftongoj, sed ordinaraj konsonantoj en silaboj. Alidire *jaro* kaj *ŭesto* devus prononciĝi:

/ya-ro wes-to/

La ascendaj diftongoj ne ekzistus, escepte en poezio, kie prozodio iafoje povus devigi al legado de du silaboj en nur unu, kiel en la ekz-o de l' Plena Gramatiko: *kormiliono* kaj *buduaro*, prononcendaj:

/kor-mi-lĭo-no bu-dŭa-ro/

Tamen konfesendas jeno: estas malfacile koncepti, ke en la sama lingvo la sama homo povus ordinare prononci

/ ya-ro yak-to yu-na /

dum li neniam havus okazon eldiri silabojn *ĭa, ĭe, ĭu* ..., sed ke subite, ĉe deklamado de poezio, li sukcesus escepte aŭdigi tiajn silabojn! Mi prefere opinias - kaj tio estas mia tezo, ke ekzistas unuj E-istoj, kiuj prononcas palatale /ya-ro, yu-na/ kaj la samaj eventuale deklamos /kor-mi-lyo-no/, se poezio devigos. Dume aliaj ordinare prononcas apertabuŝe /ĭa-ro, ĭu-na/ kaj tiuj ja prononcos /kor-mi-lĭo-no/.

Se kaj kiam la u estos uzata, iom pli ol nur sporade kiel ĝis nun, verŝajne estos eble fari similan rimarkigon.

I. PROBLEMOJ PRI LA ESPERANTA J.

Ni ĵus diris, ke *j* prononciĝas laŭ la individuoj *y* au *ĭ*. Aliaj diras, ke laŭ la okazoj *j* respondas jen al *y*, jen al *ĭ*. Ni do konsideru la diversajn okazojn kaj studu en ĉiu el ili, kiu el ambaŭ - aŭ eventuale ĉu ambaŭ - prononcoj estas allaseblaj.

Ni unue aliru la pluralajn formojn, ekz-e: *la bonaj patroj*. Kaj ni eliru el konata fakto: la nordfrancaj E-istoj ne nur tendencas misloki la akcenton al la lasta silabo, sed ankaŭ prononci kun finaj ŝuŝaj sonoj: /la bo-nay pa-troy/. Tre neelegantas tio, des pli ke ili tro longigas la lastan vokalon. Tamen tio estus allaseblа, se ne ekzistus la pluralaj akuzativoj; ni agnosku, ke ne sen ioma buŝotordo eblas sekvigi la ŝuŝajn sonojn per samsilaba fina konsonanto:

/ti-uyn be-layn blon-dayn bu-kli-tayn ha-royn/

Sekve oni instruu - ja insiste apud Francoj -, ke nepre ne temas pri la konsonanta (ŝuŝa) *y*, sed ja pri la semi-vokala *ĭ*, aŭ kurta *i*. Oni do pli facile prononcu:

/ti-uĭn be-laĭn blon-daĭn bu-kli-taĭn ha-roĭn)

Ne povas temi pri la tie neprononcebla ŝuŝa sono, sed ja pri la pura vokala sono *i*, sed diftonge uzata!

Sekve ŝajnas konsilinde same prononci en la nominativo kaj do prefere diri: /la bo-naĭ pa-troĭ/.

En tiaj okazoj prononci *y* kiel la Francoj estas almenaŭ neeleganta, se ne erara; ĉiuokaze malkonsilinda.

Ni nun transiru al la aliaj okazoj, kiam *j* troviĝas antaŭ konsonanto: *emajlo, najtingalo*. Ni vidis, ke tie *j* finas la silabon: ambaŭ *y* kaj *ĭ* estas do fizike eblaj. Tamen *ĭ* restas preferinda ne nur pro similo kun la antaŭa okazo, sed ankaŭ pro eleganteco; cetere ĝi ŝajnas ankaŭ pli internacia.

Restas nun ĉefe la okazoj, kiam *j* troviĝas iniciale aŭ intervokale, aŭ se oni preferas, kiam ĝi troviĝas silabokomence. Tiam ambaŭ *ĭ* kaj *y* ŝajnas unuavide allaseblaj: *ĭ* restas same facile prononcebla kaj eleganta, dum *y* ĉesas esti maleleganta, ĉar ne plu estiĝas karambolo inter ŝuŝa sono kaj alia konsonanto.

Verŝajne, ĉi-foje Francoj - sed ankaŭ aliaj latinidoj, jam ne parolante pri Rusoj - emas prononci /ĭa-ro, ĭu-na/, dum Germanoj aŭdigos: /ya-ro,yu-na/: ĉiuj lasas sin influi de sia lingvo. Cetere ne povas okazi konfuzo:la diferencoj de prononco ne povas modifi la signifon; ja temas pri nur unu fonemo dumaniere prononcebla. Cetere pri tiuj faktoj mi alvokas al esplorantoj konstati, kio reale estas la elparolo ĉe tiaj kaj tiaj parolantoj.

Aliparte eblas havi du kontraŭajn opiniojn. Aŭ oni povas diri: "bone, estas du sonoj por tiu fonemo, sed tio ne gravas kaj Zamenhof uzis por ambaŭ nur unu literon por simpligi la ortografion;" Sed eblas alpreni la malan tezon: Zamenhof donis al ni " fonetikan alfabeton" en kiu *j* devas havi kiel ĉiu litero nur unu sonon; kaj ĉar ekzistas (oftaj) silaboj *ojn, ajn*..., do tiu unu sono de *j* devas esti *ĭ*; ĝi povas esti nur la kurta i !

Kaj efektive nenio malhelpas prononci /ĭa-ro, ĭu-na/, sufiĉas teni la buŝon aperta, iom pli larĝa, tiel ke la lango ne tro proksimu al la palato. Tiu prononco estas same facila kaj samgrade internacia, kiel la prononco /ya-ro, yu-na/, en kiu la buŝo estas malpli larĝe aperta kaj la lango devigas la aerkolonon froti la palaton. Verŝajne, kiel jam rimarkigis al mi Marcel Laignier, L.K. antaŭ 20-o da jaroj Zamenhof havis antaŭ si la rusan lingvon tiel mole alparolatan, tiel riĉan je sonoj ĭ, ke preskaŭ ĉiu vorto enhavas almenaŭ unu molan silabon, kaj ke la alfabeto mem kalkulas plurajn i-diftongojn, prefere ol la pli sekan germanan, kiun li same bone konis, praktikis kaj ŝatis; sed kiu ne posedas molajn sonojn, escepte kelkajn descendajn diftongojn, el kiuj la pli ofta estas *aĭ (Eĭ,Ŝuĉhereĭ,...)*.

Nu, eble ekstremistoj defendos la tezon, ke duobla prononco de *j* estas kontraŭ-Fundamenta, sed inverse, ni rimarku, ke tiu duobleco alportus akvon al la muelilo, de kiuj dezirus riĉigi nian alfabeton per la litero *y* (igrek). Tiam y estus la ŝuŝa konsonanto kaj *j* restus por reprezenti la nuran sonon *ĭ*; ekz-e:

" yen la loyalaj yunuloj"

Sed tia skribmaniero estus prave rigardata kiel komplikigo, sen granda praktika intereso. Per ĝi kelkaj latinidaj vortoj retrovus internacian fizionomion *(bayoneto, fayenco, gaya, goya)*, aŭ almenaŭ okcidente internacian (germanoj, nederlandanoj kaj skandinavoj skribas *bajonet*, same kiel serbo-kroatoj kaj eble aliaj slavoj: cetere francoj skribas *baĭonette*; y estas nur en la hispana kaj angla vortoj, italoj kaj portugaloj uzas i ...). Sed por tia tre duba gajne-

to, tia skribmaniero difektus la aspekton de sufiĉe multaj aliaj vortoj: "*yuro, yusta* estas malpli prudentaj ol *juro, justa*", kiel jam asertis prave Prof. Collinson: Zamenhof trovis bonan kompromison inter grafismo kaj fonetismo: tre dubeblas, ĉu io pli bona trobeblus; unu havata pli valoras ol du trovotaj. Aliparte vortoj kiel *jaro, juna* perdus la germanan aspekton por akiri anglan, sed *ja, juki* kaj aliaj senkompense perdus la germanan. Fine multaj vortoj perdus la latinan, kaj samtempe plej ofte, la internacian fizionomion: *jam, Januaro, jugo, juglando, Julio, Junio, junipero*... Ni ankaŭ konsideru, ke tiu riĉigo modifus la skribon de sufiĉe multaj vortoj: certe pli ol la triono de la Fundamentaj vortoj entenantaj la literon *j*, kaj verŝajne simila proporcio de l' ne-Fundamentaj! Kiel tia, ĝi tre simulus al reformo kaj ni devas do ĝin kondamni.

2. PROBLEMOJ PRI LA ESPERANTA Ŭ

Skeme, la Esperanta *ŭ* almetas problemojn similajn al tiuj de la Esperanta *jo*; ili akceptas similajn solvojn. Tamen grava diferenco ekzistas jam pro tio, ke origine *ŭo* formis nur la du diftongojn *aŭ* kaj *eŭ*, sed nenion alian.

Poste oni ekuzis la diftongon *oŭ*, sed praktike nur en la vorto *poŭpo*, por kiu PIV preferas - sed ĉu prave? - la formon *pobo*.

Paralele okazis premo de internaciaj vortoj de anglo-saksona deveno, kiel ekz-e *watt, wharf, whisky, whist* ... aŭ de propraj nomoj ne nur anglo-seksonaj *(Wakefield, Washington, Wellington, Wells, Wight, Wilson, Wood,...)* sed ankaŭ flandraj kaj nord-francaj (Wallon, Waterloo, Watteau,...) aŭ eĉ Ekstrem-Orientaj: ĉinaj (en "franca ortografio": *Wei-Hai-Wei, Wentchéou, Kouang-tchéou-wan,...*), japana (en la oficiala Hepburn-transskribo: Kawaguchi, Kawasaki,... Wakamatsu,...).

Pro tiu premo enkondukiĝis en Esperanton la kombinoj *ŭa, ŭe, ŭo* ktp... Tamen estas notinde, ke tre grue ili aperis sub la propono de nova ortografio, nome de ortografio per *w: wa, we*...

Ekz-e, en la "Provo de Marista Terminaro" (1908) de Rollet de l' Isle oni trovas en la indekso sur p. 74 jenajn vortojn: *waĉo, warfo, westo, winĉo* kune kun jena piednoto:

"Ŝajnis necese al la aŭtoroj enkonduki la literon W - kiu estas elparolata kiel U - por konservi al kelkaj radikoj la fizionomion de la anglaj vortoj de kiuj ili devenas, kaj, ĉar la elekto de radikoj komencantaj per la litero U sekvata per vokalo ŝajnis ne dezirinda al multaj lertaj esperantistoj".

Sed jam en la 1907. Ch. Verax en sia "Vocabulaire Technique" notis *wato, watmetro* kaj *kilowato*.

En la Julia numero de "Lingvo Internacia" (p.331), tiam direktata de la severa "Fundamentisto" Th.Cart aperas favora recenzo de K. V. (verŝajne Ch.Verax) pri la "Provo" de Rollet de l' Isle. Aparta alineo tie tekstas:

"Rimarkinde estas, ke la litero *w* ŝajnas definitive enpenetri en la sciencan fakon de nia lingvo, tute kiel ĝi enpenetras en vivantajn lingvojn, kiuj ne posedas ĝin en sia fundamenta alfabeto, per la uzado de iaj anglaj terminoj, kiuj ne havas ekvivalentojn en tiuj lingvoj, kaj estas nun internacie komprenataj kaj uzataj. Kompreneble, *w* konservas sian anglan elparoladon, kiu respondas al *ŭ* antaŭ vokalo."

Al tiuj asertoj ne venos rebato en la sekvaj numeroj de "L.I. "

En la 1909. Boirac komentas en sia "Plena Vortaro" ĉe *ŭ*: ĝia uzado kiel komenca litero ne ŝajnas rekomendinda"; li tamen lojale registras *ŭato* kaj *ŭatmetro* prenitaj ĉe Rhodes (1908.). Plie li donas tutan ĉapitron pri *w*, kiu komenciĝas jene: "W, ne Esperanta, preskaŭ internacia, uzata de kelkaj aŭtoroj ĉe la komenco de vortoj anstataŭ *ŭ* aŭ *v*". Fine, en aliaj lokoj, kaj ĉefe en la "Aldonoj" troveblas la

formoj *vato* (prenita el la Tabelo de la "Internacia Scienca Revuo" (DEC 1904.).

Sed la formo *vato* - same kiel *vesto* por *westo* - identa al la Fundamenta *vato* (=kotono kombita kaj premita laŭ molaj tavoloj" :PV) ne povas taŭgi: kion ĝi signifu i.a. por kuracisto? elektra aŭ kotona vato, kiujn ambaŭ li bezonas?

En la 1910. Verax ĉe l' komenco de sia "Enciklopedia vortareto" komentas jene: "Oni rimarkos, en la jena vortareto, la uzon de la litero *w*, kiu ne apartenas al la Esperanta alfabeto, en kelkaj vortoj de angla deveno internacie uzataj. Ŝajnas al ni nekonsilinde anstataŭigi tiun literon kiel komencliteron per *ŭ*, kiun Esperanto uzas nur *post* la vokaloj *a* kaj *e*. Ĉu pli simple ne estas konservi la literon *w*? Konservante ĝin, ni nur konformiĝas kun tre internacia kutimo, ĉar la anglaj vortoj komencantaj per *w*, kiuj eniris en aliajn lingvojn, konservis tiun komencliteron eĉ, kiam ĝi ne ekzistas en la alfabeto de la akceptanta lingvo, aŭ ekzistas kun malsama elparoladon. Same, en Esperanto la litero *w* konservos sian anglan elparoladon, kiu respondas al *ŭ*." Verax verŝajne aludas la italan, kiu ne posedante la literon *w* tamen konservas interalie la vorton *watt* kun angla prononco almenaŭ de w, kaj aliparte la germanan, kiu prononcas sian *Watt* proksimume *ŭat*, kvankam germana *w* valoras nian *v*.

Sed ja la "E-o-F vortaro" de Grosjean-Maupin (1910.) en sia Suplemento donas la plej longan liston de *w*-vortoj; al la jam cititaj li aldonas *Walo* aŭ *Welo* (iu brita etno), *wanto* (ŝipa stajo), *wigo* (iu partio), *wisto* (iu kartludo). Estas vere, ke aliloke li donas: *Gvalo, visto* kaj plie: *wato, vato, ŭato, ŭesto, ŭarfo* kaj *varfo*, formoj tiam troveblaj ĉe diversaj aŭtoroj. Ĉe *w*, li notas: "*w*. litero kiu prononciĝas kiel konsonanta *u* (*ŭ*, angla *w*) uzata anstataŭ la komenca *ŭ* aŭ anstataŭ la *v* en la kombinoj *kv, gv* apartenantaj al unu sama silabo". Mi tamen ne povis trovi vorton kun *kw* aŭ *gw* en lia vortaro.

Necesas konstati, ke por preskaŭ ĉiuj ĉi vortoj oni iom post iom uzis la ortografion per simpla *v*. Ĉu pro simpla inercio, ĉu pro volo al severa unueco ankaŭ de l' ortografio? Ĉu pro opinio - ne forgesu ke en la 1910. ni estis plene en la batalo kontraŭ la Idoskismo! - ke tiu novismo rezultas el Idisma influo? Ĉu simple pro tio, ke nia lingvo bedaŭrinde ankoraŭ tiam ne sufiĉe aplikiĝis al teknikaj kaj sciencaj kampoj? La problemo restis subdormanta sub la cindro; nur du ruĝaj braĝoj restis videblaj: *westo* ŝancelis inter *uesto* kaj *ŭesto*, dum penseblaj estus *oesto* kaj *ovesto* laŭ respektive la hispana kaj la itala: *wato* pli diverse sin vestis tra la tempo kaj laŭ la aŭtoroj: *ŭato, uato, vuato, vato, vatto*, dum ŝajne neniu pensis pri la hispana *vatio*. Tamen nur teknikistoj vere sentis la problemon: iliaj pioniroj trovis nedezirinda la uzon de *ŭo*. La popolo simplige rekondukis al *vo*. Ĉiujn vortojn ĝi tiel rekondukis; ĉiujn, kiujn ĝi uzis; *vesto* estus ĝena, sed *okcidento* sufiĉis; *vato kotona* ne estis konata de ĝi, ĝi do bonkore uzis *vato* en la signifo elektra en la sporadaj okazoj kiam ĝi bezonis ĝin! La lingvo ankoraŭ estis - kaj eble ankoraŭ parte estas - en periodo, kiam ne plene uzata ĉiutage, ĉiudirekte, universale, ne ĉiuj vortoj same elvokivas en la mensoj kiel la samsignifaj naciaj: en tia nivelo de la lingvo-uzo *vato* apud *vato* eblis; tamen *vesto* apud *vesto* - ne! Eĉ la dua eldono de P.V. entenas ankoraŭ *vato* (elektra unuo); sed en teknikaj rondoj naskiĝis multaj sinonimaj formoj, kiel ni vidis. Solvo estas serĉata.

Ĉu ni do ekuzu *w*, kiel la angla kaj la ekstrem-orientaj? ĝi estus pliriĉigo de l' alfabeto kaj ebligus konservi la originan skribon de l' koncernaj vortoj, same kiel jam faras sufiĉe multaj lingvoj, por kiuj tiu litero aŭ ties sono, tamen respektata, estas fremda.

Tiu pliriĉigo estus akceptebla, kiel solvo por nova problemo, t.e. por problemo ne solvita de l' Fundamento. La Fundamento konas nur *aŭ* kaj *eŭ*. La internacia sono *w* penas eniri en la lingvon sub la masko de diversaj surogatoj: *v*, *u* aŭ *ŭ*. Plureco ofte indikas, ke ĝusta solvo ankoraŭ ne estas trovita. La Internacia Fonetika Alfabeto havas kaj *j* kaj *w* ; al Esperanto ankoraŭ mankas la dua.

Sed la malan tezon eblas subteni: temas ĉu pri konsonanto *w* plus vokalo, ĉu pri ascenda diftongo kun semi-vokalo *ŭ* ;por ambaŭ Esperanto unuforme disponas nur pri unu literbildo: ĝin oni do uzu!

Al kio eblas rebati, ke kvankam la Fundamento enhavas en sia alfabeto-tabelo kaj la minusklan kaj la majusklan ŭ, tamen ŝajnas, ke relative multaj E-o-presejoj ne disponas pri la majuskla : oni ĝis nun ne bezonis ĝin! La Fundamento ne preskribis ĝin komence de vortoj, eĉ ne de silaboj...

Finfine, *w* - kiu tiam povus alnomiĝi *we*[1)] - aperus kiel bonega ortografia kompromiso, precipe se oni pensas pri ĝia vasta internacieco. Cetere jam nun en Esperanto, oni uzas minusklan we-on, same kiel en la aliaj lingvoj, kiel simbolon por *wato*, kaj majusklan - por *weeto* kaj *wolframo*, sinonimo de *tungsteno*, la peza ŝtono de la svedoj. Ni tamen rimarku, ke la transskribo *volframo* certe pli ĝustas pro la germana deveno; sed la skribo per *w* estus pli internacia kaj pravigus la simbolon... Lingvo ĉiam estas kompromiso!

Lasta demando pri *we*: kio estu ĝia ĝusta prononco? Ĉu ĝi estu la supre priparolita konsonanto *w*, aŭ la samloke priparolita semivokalo *ŭo* antaŭ vokalo? Nur la venonteoo povos respondi: ĝi unue enkondukiĝu skribe; poste ĉiu elparolu kiel estos nature al li;pli poste venos studo kaj sankcio...

Sed per tio ni konstatu, ke ni tute ne traktis la demandon:"kio estu la prononco de la Esperanta *ŭ* ?" Nu, ni tamen konsiderinde limigis la demandon per la ĵus dirita: ni eliminis la problemon de ambaŭ kombinoj /wa/ kaj /ŭa/, kiel ajn oni skribus ilin. Restas do la nura problemo de la descendaj diftongoj *aŭ*, *eŭ*.

Ĉi-lasta problemo ŝajne estas tre simpla: la buŝo larĝe malfermiĝas por diri *a* aŭ *e* kaj plene fermiĝas eldirante la silabofinon sub formo de kurta *u*. Tamen, kio okazas ĉe eldiro de *antaŭa?*

Ni jam parte levis tiun problemon ĉe la ĉapitro pri silabado. Se ni respektas la diftongon /an-taŭ-a/, ni simple aldonas *a* post eldiro de *antaŭ*; sed plej ofte tiam aŭdiĝos parazita *w*: /an-taŭ-wa/, tute same kiel en *mia* aŭdiĝas parazita *ĭ* aŭ *y*:/mi-ĭa/ aŭ /mi-ya/ . Sed se ni volas apliki la ĝeneralan regulon de silabado, t.e. silabi /an-ta-ŭa/, ĉu ni ne ŝanĝos *ŭ* al *w*, t.e.: /an-ta-wa/?

Kompreneble, tiuj demandoj estas ĉefe teoriaj: la diferenco inter semivokalo *ŭ* kaj konsonanto *w* estas ankoraŭ malpli granda ol la diferenco inter *ĭ* kaj *y*. Sed de ilia solvo povas dependi ĝusta instruado kaj ĝi povas evitigi diversajn senutilajn deviojn en la prononcado.

* * *

Ŝajnas, ke malgraŭ eventuala leĝitimeco de duobla prononco (konsonanta kaj semivokala) por ambaŭ esperantaj literoj *j* kaj *ŭ*, ekzistas en Esperanto nur du fonemoj *j* kaj *ŭ*.

La studo de tiu prononco, krom teoria povas esti ankaŭ de pedagogia utilo kaj celi, se eble, ankoraŭ pli grandan unueciĝon de la elparolado.

Akcesore greftiĝas al tio la nova problemo de la definitiva ortografio de kelkaj vortoj: ĉu adopti *wato?* Tie *w* aperas de ekstere kiel rezulto de premo de l' internacieco, kaj de interne kiel kompromiso inter grafismo kaj fonetismo, same cetere kiel *c*, *ĉ*, *ĝ*, kiuj en rigore fonetika sistemo eble devus cedi antaŭ *ts*, *tŝ*, kaj *dĵ*.

SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio

El Vol. 24 n-ro 2/3(100/101) 20.5.1973.

KLASIFO DE ORACIOJ

(FÉLIX GARCIA BLÁZQUEZ, CARACAS, VENEZUELO)*/

En nia unua artikolo "Terminologiaj demandoj en sintakso [1] ni estis menciintaj kiel tipojn de oracio: simplan kaj kompleksan unuflanke, subordigitajn kaj sendependajn aliflanke. Kompreneble ekzistas aliaj kriterioj por klasifi oraciojn, sed antaŭe ni klarigu iom pli la supre menciitajn konceptojn.

La unuan kriterion, ni povas nomi s t r u k t u r a, ĉar ĝi rilatas al la konstituantaj elementoj de la oracio. Memorante la difinon: simpla oracio estas tiu kiu havas unu solan verbon en finita formo, tie ni vidas ke la simpleco estas komprenata rilate al la inkluzo de unika verbo en la oracio. Ne estas nepra, la simpleco de la sintaksaj elementoj: subjekto, verbo, postverbo k.c.

Je ĝeneralaj trajtoj la finita formo de verbo rilatas al tiuj kazoj en kiuj la verbaj akcidentoj estas esprimataj pere de finaĵoj. Iu el la plej konataj difinoj postulas nur la personan formon, sed oni devas kompreni ankaŭ aliajn akcidentojn laŭ la kutime eksponitaj ekzemploj. Indiko de persono ĉe verbo povas situi ekster ĉi-lasta en persona pronomo kiel okazas, ĝenerale, en la preterito de la anglaj verboj. Ĉi tiun saman apartigon de la akcidento persono posedas la verboj de la artefaritaj lingvoj.

La simpla oracio havas du subtipojn: nudan kaj komplementitan.

N u d a o r a c i o, ĝiaj esencaj elementoj /subjekto, verbo kaj postverbo/ estas unuvortaj, t.e. sen komplementoj. Ekzemploj:

Johano trinkas bieron /1/
Leono estas besto /2/

---

*/Apartado 68010, Karako, Venezuelo